

Esperanto en Danio

17-a jarkolekto • n-ro 2 • aprilo 2010



Ejnar kaj Karen ĉe “Krop Sind Ånd” en Aalborg

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Therkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

Retadreso: eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.06.2010

Enhavo

Kalkulaĵoj.....	4
Sukcesa Foiro en Aalborg.....	6
ILEI-kurso en Kopenhago.....	6
Mia kunlaboro kun Ivo Lapenna.....	7
IJK 2011.....	12
La UK-temo 2011.....	13
Linguapax-premio al Phillipson	13
Letero de Ĉilio	14
Esperantistoj en la pola parlamentejo.....	15
UEA en facebook.....	16
Elekta etoso ĉe UEA.....	17
1450 adresoj en Pasporta Servo.....	18
Næstved.....	19
Kopenhago.....	20
Komuniko de ILEI.....	21
El Herzberg.....	22

Ne forgesu partopreni en la
venonta jarkunveno

de Dana Esperanto-Asocio

**25-26-an de aprilo 2010 en
Kopenhago**

Tomsgårdsvej 35

kun partopreno de Stano Marček

la bonhumora aŭtoro, redaktoro
kaj bardo.


Programon kaj aliĝilon vidu ĉe
www.esperanto.dk


Kalkulaĵoj

DEAs regnskab 2009


<i>Indtægter</i>	<i>Kr.</i>	<i>Udgifter</i>	<i>Kr.</i>
Kontingent klubber	15.925,00	Administration	13.350,26
Individuaj	10.050,00	Gebyrer	292,00
DEJO	1.375,00	UEA & EEU konting.	2.185,50
Tilskud	32.050,00	4% til Noll Fonden	0
Rente	5.227,59	Arrangementer	6.869,50
		Årsmøde	./ 488,78
		EeD	10.204,40
I alt indtægter	64.627,59	Repræsentation	615,00
		Husleje	31.500,00
Årets resultat	1.053,36	Libroservo	./ 953,65
			<u>63.574,23</u>
	<u>63.574,23</u>	I alt udgifter DEA	<u>63.574,23</u>


<i>Aktiver</i>	<i>Kr.</i>	<i>Passiver</i>	<i>Kr.</i>
Obligationer	85.986,00	Egenkapital primo	211.589,00
Libroservo	36.234,07	Årets resultat	+ 1053,36
UEA konto	1.865,85	Egenkapital ultimo	232.741,36
Bankindestående	125.849,21	DEJO kapital	
38.936,00			
Debitorer	<u>2.649,70</u>	Kreditorer	<u>1.006,54</u>
	<u>252.584,83</u>		<u>252.584,83</u>


Ileana Schröder
Formand


Arne Casper
Kasserer


Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den 25/3-2010


Lars Kromann Jensen
Revisor



Tara Gregers
Revisor

Noll regnskab 2009

Indtægter	kr.	Udgifter	kr.
4% af DEAs individuaj	0	Gravsted	788
Udbytte	2.272	tilb.bet. DEA	<u>2.600</u>
I alt			<u>3.388</u>
Årets underskud	1116		
I alt	<u>3.388</u>	I alt	<u>3.388</u>
<i>Aktiver</i>	kr.	<i>Passiver</i>	kr.
Obligationer	57.936	Egenkapital 1/1 2009	59.121
Bank	69	Årets underskud	1.116
I alt	<u>58.005</u>	I alt	<u>58.005</u>



Ileana Schrøder
Formand



Arne Casper
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den 25/3-2010



Lars Kromann Jensen
Revisor



Tara Gregers
Revisor

Sukcesa Foiro en Aalborg



Dum la unua semajfino de marto Nortjutlanda Esperanto-Klubo kaj DEA partoprenis en la foiro Krop-Sind-Ånd kun bele aranĝita budo. Vizitis nin grupo de studentoj de la universitato de Aalborg kiuj elektis la prope-deŭtikan valoron de Esperanton kiel objekton de ilia venonta projekto, kaj jam komencis lerni Esperanton ĉe Ejnar Hjort.

Jen kvar el la kvinpersona grupo ĉe nia budo: Jeppe, Henriette, Thomas kaj Mark.

ILEI-kurso en Kopenhago

Komence de marto estis aranĝita porkomencanta kurso kun partopreno de 17 personoj, el kiuj dek estas studentoj. ILEI-membro Gosia Nitkowska tre sukcese instruas, kaj preskaŭ ĉiuj interesiĝas pro la partopreno en venontjara UK en Kopenhago.

Mia kunlaboro kun Ivo Lapenna

Prelego en la Kopenhago Esperanto-Kulturgrupo de la emeritita Prezidanto de Alta Kortumo de Danio, Sven Ziegler, okaze de la 100-jara datreveno de Prof. D-ro Ivo Lapenna, la 5-an de novembro 2009.

I. Por mi estas granda ĝojo kaj honoro partopreni en ĉi tiu vespero honore al Ivo Lapenna. La hodiaŭa programo amplekse pritraktas lian vivoverkon. Por mi persone estas bona kaŭzo memori parteton de tiu vivoverko, nome tiun dekon da jaroj, dum kiuj mi povis sperti vastan kunlaboradon kun li. Mi komencu per la framo de tiu kunlaboro:

II. Dum sia longa kariero kiel Esperantisto Ivo Lapenna donis sian stampon sur multaj kampoj de la kultura vivo kaj estis fonto de inspiro por la esperantistoj ĉie tra la mondo. Tio certigis al li la lokon de la plej unua rango en la historio de la Internacia Lingvo post la Unua Mondmilito.

La sumo de atingoj por Esperanto estas la frukto de la klopodoj de la tuta movado, inkluzive la multajn eminentajn samideanojn, pri kies kontribuoj sur diversaj kampoj ni prave fieras. En tiu senco la atingoj jam ne estas la verko de unu persono. La grandeco de Ivo Lapenna estis lia eminenta kapablo

1. klare difini la aktualan valoron de la Internacia Lingvo kaj de la kulturaj valoroj kreitaj en ĝi,
2. krei koncepton pri la rolo de la Internacia Lingvo en la ĝenerala historio de la homaro – kaj fine
3. lia konata talento peradi al ĉiu unuopa esperantisto tiujn ideojn kune kun sia sindona amo al Esperanto.

Kiel dotita gvidanto li kapablis inspiradi grandajn nombrojn da unuopuloj al entuziasma laboro laŭ klaraj konceptoj. Ivo Lapenna ĉiam bonege komprenis, ke nia movado, internacia laŭ sia naturo kaj reprezentita en ĉiuj landoj de la mondo, havas elstaran agadpotencialon, eĉ kompare kun grandaj interŝtataj organizaĵoj, kaj eĉ konsiderante la relative tre malgrandajn financajn rimedojn de niaj organizaĵoj: taŭge organizite, ni havas laborforton, kiu povas krei rezultojn superajn al multaj kaj egalajn al kiu ajn.

Tiu ĉi granda potencialo de la Esperanto-movado kiel monda movado organizita en Universala Esperanto-Asocio havis ankaŭ la avantaĝon forte

apogi la laboron de ĉiuj el la landaj asocioj. Kiel membroj de la tuta organismo ili ne povis ne profiti el ties sukcesoj. En siaj multaj komunikoj – buŝaj kaj skribaj – Ivo Lapenna ĉiam prave substrekis la grandan interpendecon de la laboro kaj sukceso sur internacia kaj de la laboro kaj sukceso sur landaj kaj lokaj niveloj. La samo evidente validas por la esenca kunligiteco inter la aktivadoj sur la kampoj de informado, instruado kaj altigo de la kultura vivo de la organizaĵoj, ĉar evidente ne povas havi daŭran valoron kiu ajn laboro, se unu el tiuj ĉi ĉeneroj estas difekta.

Kiel ĝenerala sekretario kaj poste prezidanto de UEA Ivo Lapenna iniciatis laborplanojn por krei taŭgan framon por la estonta laboro sur monda nivelo. Tiuj laborplanoj – kune kun la similaj landaj kaj lokaj laborplanoj – neniam celis iel burokratigi la movadon, sed simple inspiri ĝin al kiel eble plej racia utiligo de la disponeblaj homaj kaj ekonomiaj fortoj. Ĉiuj unuopaj sukcesoj dise tra la mondo povis tiamaniere fariĝi valoraj ŝtonoj por la komuna konstruaĵo. Ivo Lapenna ĉiam agadis laŭ la kompreno, ke ni estas batalanta movado, kaj ke tial ĉiuj disponeblaj fortoj estu direktataj al la ekstera mondo, dun la interna kunordigado estu lojala agado laŭ la gvidaj linioj akceptitaj de ĉiuj.

Fine mi substrekas la esencan valoron, kiu estis la fono de lia Esperanto-agado: la senkondiĉan respekton por la homaj rajtoj kiel esenca kondiĉo por nia laboro. Ni ne povas agadi por nia afero sen la rajtoj de libera esprimado, de libera asociiĝo sen ekstera politika influo ktp.

III. Mia unua impresio pri Ivo Lapenna kaj pri liaj konceptoj pri la Internacia Lingvo datiĝas de la 41-a Universala Kongreso en Kopenhago en 1956. Mi estis fortege impresita per lia tradicia inaŭgura festparolado, sed ankaŭ per lia prelego en la Internacia Somera Universitato pri faka jura temo: La maro en internacia juro. Cetere, en la kongresejo mi aĉetis lian libron Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo kaj la diskon La kultura valoro de la Internacia Lingvo. Ĉio ĉi – kune kun mia konatiĝo pri lia sukcesa batalo por la rezolucio de UNESKO en Montevideo 1954 – jam donis al mi bonan impreson pri liaj konceptoj, kiujn mi ĵus priskribis.

En la sekvaj jaroj mi transprenis plurajn taskojn. Mi ne volas ĉi tie trakti mian kunlaboron kun li en la Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj kaj dum interesaj du jaroj en la Estraro de UEA. Ĉio iris tute sen iaj problemoj en harmonia kaj demokrata labora etoso.

Mi koncentriĝas sur mia kunlaboro kun Ivo Lapenna en mia laboro sur

loka nivelo, tio estas

1. kiel gvidanto de la Informa Servo de Centra Dana Esperantista Ligo,
2. kiel gvidanto de la kampanjo por enkonduki Esperanton en la danajn lernejojn, kiun mi komencis en 1960,
3. kiel membro de la Loka Kongresa Komitato – la LKK – de la 47-a Universala Kongreso en Kopenhago en 1962, kaj fine
4. kiel membro de la Estraro de CDEL.

Temas ĉi tie pri kvar funkcioj, sed ili grandparte kovris unu la aliajn. Mi ĉiam plenumis ilin por antaŭenigi la interesojn de Esperanto en la pli granda perspektivo, prenante en konsideron tute speciale la principon de interligiteco de la laboro por Esperanto sur la diversaj terenoj.

Sur la loka nivelo mi kunlaboris kun ĉiuj personoj, kiuj povis fari kontribuon al la komuna afero – tute senkonsidere al lia aŭ ŝia membreco al tiu aŭ alia organizaĵo aŭ klubo. Tiu loka kunlaboro funkciis senglata.

Mi eluzis kiel eble plej multe la valorajn kontribuojn, kiujn oferis UEA, tute speciale ties informa fako kaj ties kampanjo por enkonduki Esperanton en la lernejojn. Ankaŭ tiu kunlaboro – ĉefe kun Ivo Lapenna – funkciadis sen iaj ajn malglataĵoj. La celo estis ĉiam unuflanke utiligi ĉiun utiligeblan atingiĝon de aliaj landoj en Danlando, kaj aliflanke mem kontribui al la ĝenerala internacia laboro per liverado de informoj pri atingiĝoj en Danlando.

IV. Bona ekzemplo de ĉio dirita estas la prelegvojaĝo de Ivo Lapenna en septembro 1961 al 12 danaj porinstruistaj seminarioj. La bonegan iniciaton prenis la ĉiam tre idealista lernejestro Stig Hansen, kiu certigis la aŭspiciojn kaj financadon de la Ministerio de Instruado. Estis formita malgranda komitato por bone organizi ĉion kaj certigi, ke la vojaĝo kaj ties rezultoj estu bone utiligataj en la cetera laboro. Ivo Lapenna – kompreneble nia plej granda atuto – konsentis interrompi sian ferian restadon en Romo por fari la 12 prelegojn en Esperanto, kiujn mi sinsekve tradukis alineon post alineo en la danan. Tio donis al la aŭskultantoj la okazon aŭskulti la praktikadon de la lingvo, kaj kun oratoro kiel Ivo Lapenna ĝi havis konsiderindan efikon. Kiel li povis poste konstati, neniu ajn el la aŭskultantoj venis al la ideo demandi, ĉu Esperanto estas vivanta lingvo. Plie, ĉar ni kunportis nombron da libroj, ni povis montri al la ĉeestantoj post la prelegoj kelkajn ekzemplojn de literaturo verkita en

Esperanto. Ĉeestis entute pli ol 2.100 gelernantoj kaj ĉirkaŭ 130 geinstruistoj. La gazetaro estis informita pri la prelegvojaĝo, kaj aperis granda nombro da informoj kaj artikoloj en la lokaj gazetoj kaj porinstruistaj revuoj.

Post la finiĝo de la prelegvojaĝo Ivo Lapenna kaj mi – kiu ja gvidis la lernejan kampanjon de CDEL – vizitis la Ministraron de Edukado, s-ron Kresten Helveg Petersen. Ni deziris esprimi nian dankon pro la subvencio, kaj ni deziris informi lin pri la rezultoj de la prelegvojaĝo kaj pri la Internacia Lingvo ĝenerale. La vizito vekis tre bonan, por ni tre oportunan, impreson ĉe la ministro, kiu faris interesitajn demandojn kaj multajn notojn. En la daŭro de la konversacio Lapenna rakontis pri demando de Interŝtata Konvencio pri laŭgrada paralela enkonduko de la lingvo en la lernejojn de pluraj landoj. En la tiama tempo oni atendis ĉiumomente ian iniciaton pri la afero fare de la pola registaro. La Ministro promesis pozitive konsideri la aferon.

Antaŭ ol forlasi Danlandon Ivo Lapenna prelegis al la membroj de ĉiuj kluboj en Kopenhago pri "La Perspektivoj de la Lerneja Kampanjo", kaj ni do utiligis la okazon ankaŭ por doni altan kaj informoriĉan enhavon al la kluba vivo.

Tiu tuta prelegaranĝo estis laŭ mia modesta opinio plena sukceso el ĉiuj vidpunktoj:

1. bona informado al la publiko,
2. disvastigo de la scio pri Esperanto en la instruista medio kaj fortigo de la lerneja kampanjo,
3. kreo de bonegaj rilatoj kun la Ministerio de Instruado, ankaŭ tre utila por la lerneja kampanjo,
4. altigo de la nivelo de la kluba vivo.

Vere oni povas diri per la vortoj de Heinrich Heine: *Mein Liebchen, was willst du mehr?* aŭ – en la traduko de Waringhien: pli – kion vi volas, trezor'?

Sed la Estraro de CDEL ne estis trezor': ĝi volis pli – aŭ pli precize: ĝi postulis malpli. Ĝi forte riproĉis al Ivo Lapenna, ke dum la konversacio kun la Ministro de Edukado li eĉ tuŝis la demandon de Interŝtata Konvenenco. Ĝi opiniis, ke la ĝenerala sekretario de UEA kun sia plena superrigado pri la progreso de Esperanto sur diversaj kampoj, inkluzive de

la agado por Esperanto en la lernejojn, havus la devon absolute ne paroli pri ĉi tiu sia scio aldone al la ceteraj utilaj informoj donitaj al la sciavida ministro! Kaj ke – ĉar li tamen faris tion – li enmiksas sin en internajn danajn aferojn, pri kiuj estas kompetenta nur la dana asocio. Aŭdante tion, mi vere ne fidis al miaj propraj oreloj. Mi ja persone ĉeestis la konversacion kun la Ministro kiel reprezentanto de la dana asocio kaj havis pri ĝi nur tre pozitivan impreson, kaj mi sentis min ege dankema pro la tre pozitiva kontribuo de Ivo Lapenna. Mi jam pli frue esprimis al Ivo Lapenna ĉi tiun dankemon nome de la Lerneja Kampanjo de CDEL.

Tiu sinteno de la Estraro de CDEL estis unu el tiuj seniluziigoj dum mia laboro, kiu iom post iom rezultigis mian ekziĝon el la laboro. Des pli ĉar tiu sinteno estis ripetata kaj ripetata vaste tra la dana movado dum la venonta tempo.

V. Bedaŭrinde saman sintenon oni povis sperti rilate la Universalan Kongreson de Esperanto en Kopenhago en 1962. En grava situacio por la Movado, ĉar ne estis eble trovi aliajn urbojn pretajn inviti al Universala Kongreso tiun jaron, la du lokaj kluboj – KKK kaj SEK – sendis invitleteron al la Estraro de UEA kaj starigis laborpretan lokan kongresan komitaton. La Estraro de CDEL ne povis ne aprobi la inviton kaj la konsiston de la LKK, sed ĝi postulis, ke la Estraro de UEA ŝanĝu aŭ ŝanĝigu la Kongresan Regularon rilate la distribuon de eventuala malprofito de la Kongreso. Tio estis neebla jam pro la nekontestebla fakto, ke oni ne disponis pri la tempo necesa por sufiĉe funde prepari decidon laŭ la Statuto de UEA. La LKK plene rekonis tion kaj plene akceptis la riskon certe tre realan, kiun ĝi devis porti laŭ la valida Kongresa Regularo. Farinte tion, aliflanke, ĝi prave atendis la plenan apogon de la dana asocio. Tion ĝi tute ne ricevis, kaj pro tio efektive la ekonomio de la Kongreso grave endanĝeriĝis. Ke fakte la Kongreso survivis finance kaj fariĝis bela sukceso, ne estas la merito de la landa asocio. Aliflanke, la kunlaboro de la LKK kun Ivo Lapenna funkciadis la tutan tempon sen ia problemo.

IV. Post ĉi tiuj skizaj rimarkoj mi povas konkludi, ke miaj personaj spertoj pli ol konvinke pruvas, pri kiu grandega aktivo disponis UEA dum jardekoj. En aliaj, profesiaj, komercaj, medioj gvidanto kun tiaj kapabloj krei inspirajn konceptojn kaj fari el minimumo da rimedoj maksimumon da rezultoj estas ĝenerale laŭdata kaj aldone al tio alte pagata. Bedaŭrinde eĉ tia tute racia kompreno de la tuta afero ne sufiĉe penetris en la Esperanto-movado, en kiu tute male aperadis diroj pri la kvazaŭa

diktatoreco de Ivo Lapenna kaj pri lia kvazaŭa granda emo mikis sin en la internajn aferojn de la landaj asocioj. Kiel mi montris per la ekzemploj, tio devus esti okazinta ankaŭ en Danlando kaj eĉ en mia ĉeesto kiel tiama reprezentanto de la dana landa asocio! Unu afero estas la malĝustaĵo de tiaj onidiroj. Tute alia afero estas la kunvivado kun ili dum jardekoj kaj la tre temporaba pritraktado de ili. El mia propra sperto mi povas atesti, ke estas pli ol kuraĝe daŭrigi en tiaj kondiĉoj la pluan konstruadon de la granda vivoverko kaj konstante rezigni pri la certe ofte kaj forte sentata tento forlasi la tutan aferon. Tian kuraĝon havis Ivo Lapenna, kaj tian kuraĝon li pruvis poste, kiam en 1974 li decidis daŭrigi sian laboron malgraŭ la malbela komploto, kiu pro mikspoto de nelaŭdindaj motivoj devigis lin ekŝiĝi el la gvida funkcio en UEA, kiun li tiel elstare plenumis.

Mi tiam jam ne plu estis membro de CDEL. Mi estis tamen profunde ŝokita, ke tiu asocio partoprenis la komploton en kunlaboro kun la asocioj de la tiama komunisma bloko en Eŭropo, kaj ke ĝi tiel fakte ludis la fifaman rolon de kunvojaĝantoj aŭ, kiel diris Lenin: utilaj idiotoj.

Mi estas danka kaj tre fiera, ĉar mi povis sekvi la laboron de Ivo Lapenna pli proksime dum jardeko kaj ankaŭ partopreni en ĝi. Kiel dana esperantisto mi samtempe sentas bedaŭron kaj honton, ĉar la dana asocio ne estis sufiĉe matura por juste rekoni la grandecon de tiu laboro kaj plene kaj lojale partopreni en ĝi. La ordinaraj kopenhagaj esperantistoj, kiuj ofte ĝuis liajn prelegojn, havis tute malan sintenon. Mi finas citante unu el ili, kiu parolu por la multaj. Temas pri la prezidanto de la laborista asocio Aage Bense, kiu tutsimple diris al li: Vi estas esperantisto numero 1.

IJK 2011

TEJO ĝojas anonci, ke la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ukrainio. Tio estis decidita dum lasta reta estrarkunveno.

Temo proponita por la kongreso estas “Stabila evoluo – nova koncepto por la homaro”. La aranĝo okazos julie 2011 proksime al Kievo, ĉefurbo de Ukrainio. La organizan teamon kreos UkrEA (Ukrainia Esperanto-Asocio) kaj ULEJ (Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo). Tio estos la unua IJK en Ukrainio. La kongresejo troviĝas proksime de la Kieva akva rezervejo.

Cetere, la 66-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Kubo. Pliajn informojn pri ĝi serĉu ĉe <http://tejo.org/ijk/2010>.

Lukasz Żebrowski

La UK-temo 2011

La estraro de UEA ĵus decidis, ke la kongresa temo por la UK en Kopenhago en 2011 enkadriĝos en la temo ‘Internacia Jaro de Junularo: Dialogo kaj Interkompreno’. Ĝi estas unu el la UN/Unesko-temoj por la koncerna jaro.

Ke ĝi ‘enkadriĝos’ signifas, ke tio ĉi ne estas la preciza kaj definitiva vortumo de la kongresa temo, sed ke la kongresa temo nepre devas ligiĝi al tiu UN/Unesko-temo.

Por la diversaj instancoj, vi do povas tute trankvile diri, ke la temo de la UK sekvas la jaran temon de UN/Unesko, kaj ke do por 2011 ĝi estos pri ‘internacia jaro de junularo: dialogo kaj interkompreno’, eĉ se la vortumo mem ŝanĝiĝos (sed ne la ideo – pri kio ni voĉdonis nun).

Claude Nourmont

Linguapax-premio al Phillipson



Prof. Robert Phillipson estas unu el la du laŭreatoj de la ĉi-jara Linguapax-premio. Phillipson estas emerita profesoro de la Fakultato de Lingvoj, Komunikado kaj Kulturaj Studoj de la Kopenhaga Lernejo pri Komerco. Li estas ĉefe konata pro siaj studoj pri lingva imperiismo kaj rilatoj inter lingvo kaj potenco. Liaj plej konataj libroj estas “Linguistic imperialism” (Lingva imperiismo), pionira verko aperinta en 1992, kaj “Ĉu nur-angla Eŭropo?” (2003), kiun UEA eldonis en Esperanta traduko en 2004. En la serio de Esperanto-dokumentoj aperis de li “Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj” (2002). Li ankaŭ prelegis en pluraj Nitobe-simpozioj.

Krom Phillipson, la premion ricevis Miquel Siguan i Soler, emerita profesoro de la Universitato de Barcelono. La premioj estis publikigitaj en la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo la 21-an de februaro.

Linguapax, kiu estiĝis fine de la 80-aj jaroj kiel projekto de Unesko, estas neregistara organizaĵo por la konservado kaj akcelado de lingva diverseco en la mondo. Kiel la nomo aludas, ĝi bazas sian agadon sur la ideo, ke lingvoj kiel portantoj de identeco kaj kultura esprimado estas nedisigeblaj

disde la celado por paco kaj interkultura kompreniĝo. En 2001 la Kataluna Unesko-Centro transprenis la daŭrigadon de la projekto kaj ĝia sidejo estis starigita en Barcelono.

[gazkom uea 366]

Esperantistoj en la pola parlamentejo



La 4-an de marto en 2010 la vicprezidanto de Pola Sejmo (la malsupera ĉambro de la pola parlamento) Jerzy Szmajdzinski akceptis en la parlamentejo esperantistojn: Ilona Koutny d-ino, Francisko Witucki, Eduardo Kozyra, Kazimiro Krzyzak kaj Mariano Zdankowski. La vicprezidanton akompanis deputito de Pola Sejmo, Leszek Aleksandrak.

En la renkontiĝo estis planita ĉeesto ankaŭ de prof. Krystyna Lybacka, eksministrino pri edukado, sed ŝi nun ne povis partopreni (renkontigo kun la parlamentanino Lybacka estas planata en Poznań en proksima tempo).

La esperantistoj prezentis al la vicprezidanto de Pola Sejmo la deziron, ke Esperanto ricevu statuson de lingvo, samranga kiel la aliaj fremdaj lingvoj en la pola edukad-sistemo.

La parlamentanoj kun bonvolemo rilatis al la propono. Ili sugestis, ke la Esperanto-grupo proponu al la ministro pri edukado komenci proceduron por la realigo de la prezentita celo. Ili samtempe deklaris apogi la iniciativon.

La renkontiĝo pasis en amika etoso kaj finiĝis per komuna fotado.

[Ret-Info <http://www.eventoj.hu/>]

UEA en facebook

La paĝo de UEA en la socia retejo Facebook atingis la nombron de 1000 “ŝatantoj”. La paĝo estis kreita en novembro. En ĝi aperas mallongaj informoj, kiuj ial malpli taŭgus ekzemple por Gazetaraj Komunikoj, sed povas temi ankaŭ pri referencoj al pli vastaj informoj en Gazetaraj Komunikoj aŭ aliloke. Ĉiu rajtas ankaŭ mem skribi en la paĝo aŭ komenti tion, kion aliaj skribis. Eblas ankaŭ aŝi ekzemple fotojn.

71% el la ŝatantoj estas viroj kaj 26% virinoj (la sekso de 3% ne estas konata). Inter la individuaj membroj de UEA 66% estas viroj kaj 30% virinoj. 22% estas malpli ol 25-jaraj, 24% estas 25-34-jaraj, 34% 35-54-jaraj kaj 19% pli ol 54-jaraj. La bildo estas do tre malsama ol inter la individuaj membroj, inter kiuj nur 7% estas malpli ol 30-jaraj.

Ankaŭ la pinto de la laŭlanda statistiko diferencas disde la membrostatistiko de UEA: Usono 142, Brazilo 73, Francio 62, Italio 62, Pollando 52, Hispanio 46, Germanio 39, Ĉilio 37, Britio 29, Meksiko 29, Nederlando 25, Hungario 24, Rusio 23.

Facebook statistikas ankaŭ laŭ urboj: San-Paŭlo 38, Santiago de Ĉilio 34, Madrido, Romo kaj Varsovio po 23, Parizo 21, Budapeŝto 17, Barcelono 15, Prago 13, Milano 12, Stokholmo 12, Guadalajara 11.

Verŝajne ne ĉiuj ŝatantoj scipovas Esperanton. Pri ilia lingvoscio tamen ne haveblas informoj. Lastatempe estis kreita simila paĝo ankaŭ en VK.com, kiu nun havas 70 aliĝintojn. VK.com estas simila al Facebook, sed ĉefe bazita en Rusio kaj najbaraj landoj.

Elekta etoso ĉe UEA

14 membroj de UEA el 12 landoj konkursos pri la rajto reprezenti la individuajn membrojn en la Komitato de la Asocio dum la periodo 2010-2013. Ses el ili estos elektitaj kiel Komitatanoj B per poŝta balotado, kiu komenciĝos en aprilo. Entute estis proponitaj 16 kandidatoj, sed du el ili ne sukcesis kompletigi siajn dosierojn ĝis la limdato fine de februaro. Ĉiu kandidato devis akiri subtenon de minimume dek membroj el tri landoj.

La granda nombro draste kontrastas kun la elektoj en 2007, kiam por sep lokoj aperis nur kvin kandidatoj kaj balotado ne necesis. Laŭ Osmo Buller, kiu pro ofico gvidas la proceduron, tio estas kuraĝiga evoluo. “Post

periodo de ia apatio kaj senkonsileco membroj denove ekinteresiĝas pri la estonteco de UEA, kiu estas tiel bildodifina pri la tuta Esperanto-movado”, li konkludas. “Espereble tiu ĉi sukcesa fino de la unua etapo de la elektoprocezo plu akcelos densiĝon de la elekta etoso, kiun mi ja eksentas en la aero.”

Buller karakterizas la elekton de B-komitatanoj kiel la plej grandskalan referendumon en Esperantujo. “Ĝi estas ankaŭ bonega maniero ankoraŭ pli proksimigi la membrojn al sia Asocio, precipe nun, kiam pro la multeco de kandidatoj vere temas pri elektoj en la plena senco de la vorto.”

La kandidatoj estas: Marija BELOŠEVIĆ (Kroatio), Paulo BRANCO (Belgio), Tomasz CHMIELIK (Pollando), Petr CHRDLÉ (Ĉeĥio), Probal DASGUPTA (Hinda Unio), Johan DERKS (Nederlando), Mark FETTES (Kanado), LEE Jung-kee (Korea Resp.), Jukka PIETILÄINEN (Finnlando), Barbara PIETRZAK (Pollando), Josip PLEADIN (Kroatio), José Antonio VERGARA (Ĉilio), Amri WANDEL (Israelo) kaj WU Guojiang (Ĉinio).

Kvar kandidatoj (Beloŝević, Chmielik, Derks kaj Pietiläinen) estas nunaj Komitatanoj B; ne rekandidatiĝis nur István Ertl, kiu unue elektiĝis en 2004 kun la plej granda nombro da voĉoj en la tiama balotado. Chrdle kaj Vergara estas Komitatanoj A; Branco, Dasgupta, Pietrzak kaj Wandel Komitatanoj C. Ĉar ses kandidatoj ne membras en la nuna Komitato, el ilia sukceso povus eĉ rezulti, ke ĉiuj reprezentantoj de la individuaj membroj en la nova Komitato estus aliaj ol antaŭe. Aparte rimarkinde estas, ke prezidanto Dasgupta, ĝenerala sekretario Pietrzak kaj estrarano Vergara prezentas sin por la prijuĝo de individuaj membroj. Tio ne venas kiel surprizo, ĉar sian intencon ili indikis jam en la Universala Kongreso en Bjalistoko.

[Ret-Info <http://www.eventoj.hu/>]

1450 adresoj en Pasporta Servo

La ĉi-jara adresaro de la plej fama servo de TEJO, Pasporta Servo, enhavas 1450 gastigantojn en 91 landoj. En la antaŭa eldono (2008) estis 1225 adresoj en 90 landoj. En la Pasporta Servo 2010 la unuan lokon okupas Francio kun 177 gastigantoj. La dua estas Germanio kun 117. En Brazilo estas 84 gastigantoj. Aliaj landoj kun multaj adresoj estas Rusio (81), Pollando (75), Ukrainio (65), Usono (63), Hungario (53), Japanio,

Nederlando, Ĉinio kaj Senegalio (po 36), kaj Irano (34).

En la 208-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj k.a. informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri lokoj kun gastigantoj. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo, kaj utilaj adresoj.

La ideo pri Pasporta Servo, tiam sub la nomo Programo Pasporto, estis prezentita de la argentinano Ruben Feldman González en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj estas gastigantoj ankaŭ en la nuna eldono.

En 2009, Pasporta Servo fariĝis ankaŭ socia retejo, www.pasportaservo.org, kie kaj gastoj kaj gastigantoj povas membriĝi kaj kontakti unu la alian. La retpaĝo ne anstataŭas la adreslibron sed ofertas novajn servojn, haveblajn nur per Interreto: zomebla monda mapo, serĉilo, forumo por peti informojn pri vojaĝo, kaj blogejo por rakonti pri siaj vojaĝoj. La retpaĝo nun havas pli ol 1200 uzantojn, el kiuj ĉ. 700 estas gastigantoj.

La adresaro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA. La prezo estas 9,00 eŭroj plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekzempleroj oni ricevas trionan rabaton.

Letero de Ĉilio

(Sendita vendrede la 19an de marto, okaze de la tertremo).

Antaŭ ĉio, koran dankon pro via retmesaĝo sendita ĉu al mi, ĉu al José A. Vergara (Pto. Montt), ĉu al Héctor Campos (Curicó). Vere via mesaĝo levis al mi mian spiriton dum la unuaj tagoj de la tertremo kaj martremo per kiu la naturo forte frapis la centron de la lando. 8,8 ° estis sufiĉe por renversi milojn da domoj kaj altaj konstruaĵoj.

Mi, mia edzino Graciolina (Ĉelj) kaj miaj filinoj Karimme, Ingrid kaj Anneliese...dank'al Dio fartas bone. Nia unuetaĝa domo toleris la teruron de la naturo. Nur kelkaj objektoj, pokakoj, glasoj detruigis ĉar la ŝranko ne falis planken ĉar brakseĝo kiu estis apud ĝi nur permesis kliniĝon de 45°. La bibliotekŝranko detruigis en la supera parto. Ĝi falis kune kun multaj libroj kaj malpermesis al mi eliri rapide de la domo. Kompreneble ne estis elektra lumo. Do, ni devis resti en la antaŭgardeno preskaŭ la tutan nokton. La tertremo estis je la 3a kaj duono matene. Bone, kiel mi diras ni

estis vere privilegiitaj kompere kun miloj da ĉilianoj kiu ne nur perdis siajn domojn...sed la plej valora...familianojn.

La tertremo, nepre estas natura fenomeno kiun la homo ne kapablas antaŭvidi aŭ kunporti. Bedaŭrine poste estis alia tertremo kiun nia Prezidentino Bachelet nomis “socia tertremo”, ĉar multaj fihomoj utiligante la malfeliĉon de multuloj, ne hezitis profiti ŝtelante la posedaĵojnde la viktimoj de la naturo. Ili ŝtelis antaŭ la vido de multaj homoj. Feliĉe multaj el ili estis fotitaj aŭ filmitaj, kaj jam ili estas en manoj de la Justico.

Sed feliĉe ankau estis la alia vizaĝo de la monero. La donacema spirito de la ĉilia popolo iris helpeme de siaj sampatrujanoj. La plimulto el ili estis junuloj, studentoj kaj aliaj volontuloj kaj unu semajnon poste organizis la tiel nomita TELETON, organizaĵo kiu ĝenerale ĉiujare rikoltas monon por la hadikapuloj. Ĝi programis kunigi dekvin mil milionojn da pesoj. Rezulte dum la tuta sabato 6a de marto oni kunigis tridek mil milionojn da pesoj (1 usona dolaro en Ĉilio estas 500 pesoj). En ĝi partoprenis la Ĉilia Registaro, “Krista Hejmo”, “Tegmento por Ĉilio”, “Caritas” (Karitato), tiuj ĉi lastaj apartenantaj al la Katolika Eklezio.

Tiu organizaĵo nomiĝis “Chile ayuda a Chile” (Ĉilio helpas Ĉilion). Kelkajn fotojn kaj videojn vi povas vidi en la retpaĝo de Ĉilia Esperanto-Asocio (www.esperanto.cl).

Ekde la dato de la tertremo ĝis nun okazis almenaŭ 5 terskuoj potage, sed feliĉe ne tiom fortaj. Mi jam al kutimiĝis al ĉi tiuj fenomenoj ĉar mi devis travivi la plej granda tertremo, tiu de 1960 en Valdivia. Mi estis en San José de Mariquina, proksimume je 120 Km. de Valdivia. Tiu tertremo estis de 9,5°. Ankaŭ estis martremo. Poste estis alia tertremo en 1970 kaj 1985....sed ankoraŭ mi vivas.

De ceteraj esperantistoj mi sciis nur pri iuj. Ekzemple pri Héctor Campos, Prezidanto de nia Asocio kiu loĝas en Curicó mi scias nur ke lia oficejo detruigis (li estas advokato)

Bone kara samideano, kara samideanino, mi kore dankesprimas pro via solidareco kaj salutas vin tutkore.

Iván Mättig Catalán
UEA-Delegito en
Santiago de Ĉilio

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. – Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111.

Okazos:

Finiĝis la kunvena sezono la 9an de aprilo, kaj venonta planita aranĝo estas la somera ekskurso, kiu ĉi-jare iros al la malvarmmilita muzeo en Stevns sabate la 12an de junio. Detaloj estas post detaligo haveblaj ĉe nia sekretario.

Okazis:

12.02: Lene kaj Jan Niemann rakontis kun multaj diapozitivoj pri sia vizito en Irlando, kiu estis parte karavana vojaĝo kune kun aliaj, kun multaj vizitoj en irlandaj trinkejoj por sperti la tiean flokloran muzikon, kaj parte individua vizito al Esperantoparolanto en granda bieno. – Kelkaj ‘eksteruloj’ pro nia reklamo ĝuis kune kun ni la rakontojn.

19.02: Ĝenerala kunveno kun malmulte da revoluciaj eventoj. – 26.02: Studado.

05.03: La stelaro ĉiam impresis kaj fascinis la homojn, kaj diversmaniere oni rigardis kaj interpretis la konstalaciojn. Pri tio rakontis Mogens Rude Andersen en sia kutime ekstreme bone preparita maniero. Spite al vasta reklamo nemultaj ‘eksteruloj’ partoprenis. Do, ĉu daŭrigi tiajn aranĝojn, kvankam ili certe donis al la urbaj civitanoj la impreson, ke la Esperanto-afero ne estas sensignifa kaj sekteca kulto.

12.03: Programŝanĝo al ordigo de kunvenejoj ŝrankoj. – 26.03: Studado en vigla etoso. – 09.04: Sezonfina aranĝo kun ruĝa vino, fromaĝo kaj ujutno.

Do: spite al maljuniĝo kaj certa natura inerto de niaj gvidantoj ni sukcesis travivi aŭtunan/vintran sezonon per kontentiga rezulto, kvankam prospero apenaŭ ekzistas.

Kopenhago

Prezidanto: Betty Chatterjee, betty.chattertee@vgpnet.telelet.dk. La kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo okazas ĉiun lundon ekde la 19:30 en Tomsgårdsvej 35.

Okazos:

- 12.04 Printempa aŭkcio
- 19.04 Studgrupo. Gvidanto Bent Wiinberg
- 26.04 Zita Garbaravičienė jam esperantigis interesan artikolon el la litova pri miraklaj akvoj. Dum la vespero Zita enkondukos diskuton pri la artikolo.
- 03.05 Amir prelegas pri ‘Faktoj kaj fantazioj pri Islamo’.
- 10.05 Pri la skribado de legant-leteroj. Gvidanto Jens Stengaard Larsen.
- 17.05 Urba rondiro gvidata de Eugeniusz ekde la stacio Østerport.
- 24.05 (Pro Pentekosto neniu kunveno).
- 31.05 Studgrupo. Gvidanto: Betty Chatterjee
- 07.06 Jan kaj Lene pri Irlando.
- 14.06 Okaze de la 160-a jaro de la naturscienca Fakultato de la Kopenhagaga Universitato, Egon Starup Jensen prelegos pri ‘August Krogh (1874 – 1949) la unua fiziologo ĉe La Naturscienca fakultato de la Kopenhaga Universitato.’
- 21.6 Somera festo.

Okazis:

La 1-an de marto Regin Larsen, la prezidanto de Dana Esperanto-Junulara Organizo, prelegis en KEK pri la junulara Esperanto-agado. Ĉeestis ne aparte multaj, eble dekkvino da aŭskultantoj. La sekva diskuto fariĝis treege interesa – la prezento mem de Regin estis relative banala, kun sciindaj novaĵoj nur por la ĉeestantaj du novaj DEJO-anoj. Nominte la prezenton banala, oni tamen devas laŭdi la bonan prononcon de Regin; eĉ la urbonomon Roskilde li prononcis [roskílde] anstataŭ [hóskill], kia ĝi estas en la Dana.

La 22-an de marto estis en KEK prelego de Bent Jensenius pri metodoj de fremdlingva instruado. Ĉeestis multaj, pli ol 20. Li komencis per la konkludo: Ĉiuj metodoj funkcias, kaj ŝerce demandis ĉu oni ne povus fini

tie. Sed li daŭrigis, kaj konvinke pledis por ne limigi sin al unu metodo, ĉar la taŭgeco de ĉiu dependas de la instruisto, de la lernantoj kaj de la situacio. La prelego estis spicita per anekdotoj, parte travivitaj de Bent mem, kaj per aktivigo de la aŭskultantoj. Ĉeestinda kunveno.

Komuniko de ILEI



La Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj prezentos sin en kelkaj esperantaj aranĝoj tra la sekvaj monatoj:

- La Beneluksa Kongreso en Antverpeno, Belgio, Majo 13-16, 2010.
- La German-Franca Kongreso en Kaiserlauten, Germanio, Majo 25-27, 2010
- La 6a Azia Kongreso en UlanBator, Mongolio, Junio 19-23, 2010
- Universala Kongreso, Havano, Kubo, Julio 18-24, 2010

En la Beneluksa Kongreso, ILEI prenos gvidan rolon en la organizado de la interkona vespero (ĵaŭde majo 13) kadre de kiu prezentos sin la partoprenontaj estraranoj – almenaŭ kvar, inkluzive de la prezidanto, sekretario kaj kasisto. Do, atendu viglan vesperon! En la dimanĉo ni okazigos fakan kunsidon por la instruistoj, kiu inkluzivos informojn pri la Eŭropkonformaj KER-ekzamenoj. Okazos kunsido de la belga sekcio, kun la tasko elekti novan sekciestron kaj krei agadplanon.

En la German-Franca Kongreso, la ĉefa reprezentanto de ILEI estos estraranino Zsófia Kóródy, kaj atendeble okazos kunsido(j) por la franca kaj germana ILEI-sekcioj.

En la Azia Kongreso la ĉefa reprezentanto de ILEI estos Mireille Grosjean, kun sekciestroj kaj membroj el pluraj aziaj sekcioj. Okazos kunsido por instruistoj, por kunordigi kaj plani la agadon kaj renkontiĝojn en Azio, cele

al pli proksima kunlaboro inter la aziaj sekcioj.

En Havano, ILEI gvidos la Tagon de la Lernejo kaj prizorgos la kutimajn edukajn iniciatojn de UK. ILEI aktive partoprenos en la realigo de la kongresa temo de la UK.

Plie, ILEI aktive subtenas trejnkurson en Burundo poste en la jaro. Por pliaj informoj pri tiuj aranĝoj, vizitu retan kalendaron, ekzemple tiun de ‘Eventoj’ aŭ vidu revuon Esperanto.

Do, se vi membras en ILEI, aŭ kiel ne-membro deziras scii pli pri nia instruista ligo, vi trovos nin en tiuj aranĝoj – kaj certe ankaŭ en pliaj. Ni anticipas renkonti vin!

Kore

Stefan MacGill

Prezidanto de ILEI

PS: Memoru, ke la fino de la dua aliĝperiodo por nia 43a Konferenco estas Majo 15. Plenaj informoj, kun pluraj novaj eroj, en nia hejmpaĝo: www.ilei.info.

El Herzberg

La Esperanto-urbo Herzberg aktivas konstante. Jen kelkaj informoj el la lastaj monatoj:

OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) organizas grandan internacian **konferencon** 17.07.2010 - 23.07.2010 en Herzberg, la Esperanto-urbo. Ĉeftemo: Kial Esperanto estas revolucia lingvo? Aliĝilo kun provizora programo kaj pluaj informoj troveblas sub:

<http://www.esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910>

Ĉu vi volas **geedziĝi** en esperantlingva ceremonio? Nun la la ĉefo de la Esperanto-urbo Herzberg s-ro Gerhard Walter ricevis la legitimadon kiel oficisto por civilstato. Geedziĝceremonioj ankaŭ eblas en la bela kavalira salono de la Welf-kastelo. Se estas bezono, bv. kontakti nin.

Ĉi-jare estos la 100-jara **Esperanto-jubileo** en Herzberg. Jam en marto 1910 aperis la unuaj esperantistoj en Herzberg. Pro tio nia esperantlingva

urbestro Gerhard Walter invitis delegacion en la la urbodomon (pro oficiala akcepto kun politikistoj) je la 25-a de marto 2010. Hazarde oni trovis gazetartikolon pri Esperanto kaj Herzberg kun la dato 11a de marto 1910, nekredeble.

Nova renkontiĝo: SANO 1 (28.12.2010 - 02.01.2011) en Herzberg-Sieber. Je la unua fojo ni ofertas alternativan novjarkomencon en la bela kaj trankvila Harz-vilaĝo ĉe la nacia parko Harz.

Ni ofertas kreemon, migradon (ankaŭ noktmigradon) al montorestoracio, termalnaĝadon (kun ebleco saŭnumi), viziton de monaheja muzeo, silvestran feston, kurson, jogon, variajn prelegojn. Ankaŭ via alternativa kaj saniga programero povas esti interesa. Bv. oferti!

La prezo por la domo (belaj 2- kaj 3-litaj ĉambroj) kun manĝaĵoj inkl. silvestrovespero, prelegoj, kursoj estas inkluzivitaj.

Ni povas oferti meze en Germanio vere favorprezan internacian alternativon.

La unuaj tri aliĝantoj pagos po 99,00 €. Ĝis la 30-a de aprilo 2010 ĝi kostos 114,00 €.

Bv. tuj aliĝi kaj vi ŝparos multe. Bv. demandi nin.

Meze de aprilo 2010 **kunvenos infanoj** el Britio (Bar Hill) kaj Miskolc (HU) kune kun la gepatroj kaj geinstruistoj al Herzberg - la Esperanto-urbo. La gepatroj de la infanoj en Herzberg estos la gastigantoj kaj preparas belan ekskursprogramon. Je la lasta tago de la projektoj okazos publika projektvespero kune kun geinstruistoj kaj politikistoj.

Ĉu vi ŝatus ricevi **novan kompaktdiskon** "Herzberg - la Esperanto-urbo kantas nr-o 2" kun internaciaj kantoj prezentataj de la Esperanto-koruso sub gvido de la korusestro Otto Kern? Ankaŭ la Eŭropa himno en Esperanto (prezentata de la gimnazia koruso) troviĝas sur la disko. Ĝi estas senkotize havebla kontraŭ sendo- kaj pakkostoj.



La ĉi-jara eldono de “Pasporta Servo”